

ISSN 2072-5825

Espero Katolika



Numero 1-3/2015

Januaro-Marto 2015



Sur la kovrilo: *En Manilo Francisko ĉirkaŭbrakas Glyzelle Palomar, 12-jaraĝa knabineto, kun pasinteco de prostituado kaj drogoj. Ŝi plorante demandis al li: "Kial Dio permesas tion?" (v. p. 4).*

ENHAVO

LA PAPO EN SRILANKO KAJ FILIPINOJ	
La ĉefaj momentoj de la dua vojaĝo de Francisko al Azio	3
Impresoj kaj personaj rememoroj de la Papo dum la revenvojaĝo	5
LA MONAĤA VIVO DE BENEDIKTO LA 16-a	
La nuna vivo de Papo Ratzinger laŭ la atesto de lia sekretario	6
EPIFANIO: la historia tradicio pri la Saĝuloj el Oriento	8
LAIKA MISIISTO BALDAŬ BEATA: Biografio de Marcello Candia	9
SANKTA FRANCISKO KAJ ISLAMO	
La misiista agado de sankta Francisko en arabaj landoj	10
La dialogo inter Francisko kaj la Sultano	11
LA 5-a DATREVENO DE LA FORPASO DE PASTRO MAGNANI	
Teksto de la ĝin nun neeldonita intervjuo kun li	15
FRANCISKO ANONCIS LA JUBILEON DE LA MIZERIKORDO	
Noto pri la Sankta Jaro / Historio de la Jubileoj / Iliaj signifo kaj ritario	17
La Dia Mizerikordo en la vortoj de Francisko	18
SIMPLA PREĜO de sankta Francisko el Asizo	18
PAGI PER PREĜO...	
Parkado kostas unu Saluton Maria'n	19
RESONANCO	19
FUNEBRE	20

Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio

Telefono kaj fakso: +39-06.39.63.81.29 - Elektronika poŝto: <ikue@ikue.org>

TTT-paĝoj: <http://www.ikue.org> - <http://www.esperokatolika.org> * Dissendolisto: <ikue@yahoo.com>

UEA-konto "ikue-v" * Banko: "Unione internazionale cattolica esperantista" Roma, Italio
IBAN IT34H076010320000023290000 - BIC/SWIFT: BPPITRXXXX

Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo - Registrazione presso il Tribunale di Roma
n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

Presejo - Tipografia

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

Respondeca Direktoro - Direttore responsabile

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italio
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

Espero Katolika, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de I.K.U.E.

INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidanto:** Giovanni Daminelli - **Vic-Prezidantino:** Marija Belošević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Ĝenerala Sekretario/Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Estrarano por ekumenaj rilatoj:** Stefan Lepping. **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli, Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.

FRANCISKO EN SRILANKO KAJ FILIPINOJ

“La vojaĝo estis, ĉefe, ĝojoplena renkonto kun la kristanaj komunumoj de tiuj nacioj kaj ĉiam mi konservos en mia koro la rememoron pri la varma kaj amema akcepto de la homoj”. Per ĉi tiuj vortoj la Papo resumis la sentojn de sia koro, post la reveno el sia dua apostola vojaĝo al Azio, okazinta de la 12-a ĝis la 19-a de Januaro.

Kvar estis la ĉefaj momentoj de la vojaĝo al Srilanko kaj Filipinoj: la sanktproklamo de sankta José Vaz, en Srilanko; la renkonto kun la familioj en Manilo; la vizito al Tacloban, epicentro de la tajfuno, kiu en 2013 preskaŭ tute detruis ĝin, estigante la forpason de miloj da homoj; la renkonto kun la junularo en la Universitato de sankta Tomaso, ankoraŭ en Manilo.

Sankta José Vaz (1651-1711) estis granda pastro-misiisto kaj modelo de interreligia dialogo. Tro ofte li devis doni la sakramentojn al la fideluloj kamuflita kiel ĉifonulo, pro la persekutado. Li prizorgis ne nur la katolikajn fidelulojn, sed li ankaŭ helpis sendistinge ĉiujn bezonantojn, kiu ajn estis ilia religio. Sekve, tiu sanktulo estas modelo por ĉiuj hodiaŭaj kristanoj de Srilanko, kiuj estas “vokataj proponi la savodonan veron de la Evangelio en plurreligia kunteksto, kun

respekto al la aliaj, en malriĉeco kaj konstante”.

La Meso kun la familioj estis la kulmina



Papo Francisko en Srilanko

momento de la vizito al Filipinoj, ne nur ĉar oni superis ĉiun rekordon: oni parolas pri 6 aŭ 7 milionoj da ĉeestantoj, kiuj, sub forta pluvo, partoprenis en ĝi en parko Rizal de Manilo; temis pri la papa evento plej partoprenata en la historio. Sed ĉefe tio, kion Francisko diris dum sia prediko estos orienta punkto, kiam oni parolos pri multmembraj familioj. “Vera konsolo kaj espero estas vidi multajn multmembrajn familiojn, kiuj akceptas la infanojn kiel donacon de Dio. Ili scias, ke ĉiu infano estas donaco de Dio”, diris la Papo. Li aldonis, ke ne estas vero tio, kion oni foje legas kaj aŭskultas, nome, ke la ĉefa kaŭzo de la malriĉeco estas la familioj kun multaj gefiloj kaj multaj naskoj. La vera kaŭzo de la malriĉeco ne estas la infanoj nek la multmembraj familioj, sed “la ekonomia sistemo, kiu forlokis la homan personon el la centro de la intereso kaj metis la monon”. Ĉi tiu ekonomia sistemo “ĉiam ekskludas” kaj “ekskludas ĉiujn”; ĝi ekskludas “la infanojn, la maljunulojn, la junulojn sen laboro, kaj ĝi kreas la kulturon de la forĵeto, kiun ni travivas”. Ĉio tio “estas la ĉefa kaŭzo de la malriĉeco, ne la multmembraj familioj”.



Papo Francisko bonvenigata en Filipinoj

Tamen, la povoj, decide firmaj, deklaras la malon, ĉar ili scias, ke enludiĝas mili-onoj kaj milionoj (en mono) kaj ilia regado mem sur la popolamasoj. Tiuj povoj kreas kaj disvastigas la eraron kaj la mensogon.



Kard. Tagle instruas mane diri: "Mi amas vin"

Tial, necesas "defendi la familiojn, por ke ili povu atesti la belecon de la projekto de Dio koncerne la familion. Necesas protekti la familion kontraŭ la ideologiaj koloniigoj, kiuj minacas ĝian identecon kaj ĝian mision", substrekis la Papo.

En Tacloban, urbo detruita de tajfuno en 2013, Francisko diris: "Mi ne povis ne esti ĉi tie". Pro la malbona vetero li celebris la Meson en areo de la flughaveno, havante sur la ornatoj flavan vaksotolon, kiun havis ankaŭ la centoj da miloj da ĉeestantoj. La forta pluvo devigis la Papon reveni al Manilo 4 horojn antaŭ ol planite.



La Papo kun ŝirmilo kontraŭ la pluvego

La gejunuloj: da ili Francisko renkontis pli ol 30.000 kaj li instigis ilin partopreni en la renoviĝo de la socio, aparte pere de la

servado al malriĉuloj kaj la defendo de la naturmedio. "La zorgemo pri la malriĉuloj estas esencaĵo de nia vivo kaj de nia kristana atesto". Tial, ni devas repuŝi "ĉiun formon de koruptado, ĉar la koruptado ŝtelas de la malriĉuloj". Kortuŝa estis la interveno de du surstrataj geknaboj, Glyzelle kaj Jun, kiuj rakontis la vivon de la etaj forlasitoj, viktimoj de trouzoj, ekspluatataj por la prostituigo kaj instigitaj uzi drogojn. «Kial Dio permesas tiajn aferojn?», demandis plorante Glyzelle. La Papo, kortuŝita, formetis la pretigitan paroladon kaj parolis improvizite: «Ŝi levis la unikan demandon, kiu ne havas respondon. Kaj mankis vortoj al ŝi: ŝi devis paroli per la larmoj. Ekzistas monduma kompatemo, kiu utilas al nenio! Ĝi estas kompatemo, kiu maksimume konvinkas nin preni la monujon kaj donaci moneron. Se Kristo havus tian kompatemon, li venus,



li kuracus tri aŭ kvar personojn kaj revenus al sia Patro. Nur kiam Kristo ploris kaj kapblis plori, Li komprenis niajn tragediojn. Jen la unua afero, kiun mi volas diri al vi: ni lernu plori, kiel ŝi [Glyzelle] instruis al ni hodiaŭ. Ni ne forgesu ĉi tiun ateston. La grandan demandon 'kial la infanoj suferas?' ŝi faris plorante kaj la granda respondo, kiun ni ĉiuj povas doni estas lerni plori. Nur kiam ni kapablas plori pro tio, kion vi travivis, ni povas kompreni ion kaj respondi ion...».

Francisko revenis al Romo fizike laca pro la vojaĝo, sed plena je ĝojo kaj konsolo: li povis konstati la kredon en tiuj du landoj kaj la potencivojn de la filipina katolikismo.

LA PAPO: «TIEL ĈI ONI KLOPODIS KORUPTI MIN»

Revenante al Romo el Manilo, dum la tradicia renkonto kun la ĵurnalistoj en la aviadilo, Francisko rakontis ion, kio okazis en Buenos Aires, kiam oni petis de li kontingenton interŝanĝe de monfondusoj por la malriĉuloj.



Renkonto de la Papo dumrevene kun ĵurnalistoj

«Kiam mi parolas pri la Eklezio, mi ŝatas paroli pri baptitoj, fideluloj, kaj ni ĉiuj estas pekuloj. Sed kiam ni parolas pri koruptado, ni parolas pri koruptitaj personoj aŭ pri institucioj de la Eklezio, kiuj falas en la koruptiĝon. Kaj da tiaj kazoj estas, jes. Mi memoras, ke en 1994, kiam mi estis ĵus nomumita helpepiskopo en kvartalo Flores, venis al mi du ministeriaj funkciuloj, kaj ili diris al mi: “Vi bezonas multon, kun ĉi tiuj malriĉuloj... Ni povas helpi vin, ni havas por doni al vi, se vi volas, helpon de 400.000 pesoj” (tiam la peso havis la saman valoron de la usona dolaro, do, temis pri 400.000 dolaroj). Mi aŭskultis. Poste ili diris: “Por fari ĉi tiun donacon, ni deponas la monon kaj poste vi donos la duonon de la sumo al ni”. En tiu momento mi cerbumis pri la farenado: aŭ mi insultas ilin kaj mi donas piedfrapon tie, kie la suno ne batas, aŭ mi montras min naiva. Mi kondukis kiel naivulo. Mi respondis: “Nu, sciu, ke ni en la vikariejoj ne havas konton, vi devas deponi la monon en la ĉefepiskopejo, kun kvitanco”.

Ili foriris. Mi pensis: se ĉi tiuj du alvenis sen esti vokataj – jen malbona penso – tio okazis, ĉar iu alia diris jes... Mi memoru tion ĉi: pekuloj jes, koruptitoj neniam estu! Ni devas pardonpeti pro tiuj katolikoj, tiuj kristanoj, kiuj skandalas pro sia korupto. Sed estas multaj sanktuloj kaj sanktaj pekuloj ne koruptitaj. Ni rigardu al la sankta Eklezio».

La interparolo kun la ĵurnalistoj daŭris dum pli ol unu horo. Multaj estis la temoj pritraktitaj, ĉefe kunligitaj kun la paroladoj de la Papo en Filipinoj. Ne mankis aludo al iu eldiro de Francisko, de li farita dum la antaŭa aviadila flugo el Srilanko al Manilo. Tiam Bergoglio, parolante pri terorismo, post la amasmurdo en la redakcio de la franca ĵurnalo “Charlie Hebdo” estis dirinta: «La religio neniam povas murdi, oni ne povas fari tion ennome de Dio». «Sed – li aldonis – oni ne povas provoki, oni ne povas moki la religion de la aliaj. Tio ne estas bone». Jes al libera esprimo, «sed se mia amiko Gasbarri [la organizanto de la papaj vojaĝoj, ndlr] diras vortaĉon pri mia panjo, li do atendu pugnofrapon». Ĉi tiu frazo ŝajnis iamaniere pravigi la perforton; pro tio en la posta interparolo, li precizigis sian penson. «Teorie, ni povas diri, ke perfortan reagon fronte al ofendo, al provoko,



oni ne devas fari. Ni povas diri tion, kion la Evangelio diras: prezenti ankaŭ la alian vangon. Teorie, ni povas diri, ke ni komprenas la liberecon de esprimo. Tio gravas, pri teo-

rio ni ĉiuj konsentas. Sed ni estas homoj kaj ekzistas la prudento, virto de la homa kunvivado. Mi ne povas provoki, insulti personon konstante, ĉar mi riskas, ke li koleriĝos; mi riskas ricevi ne ĝustan reagon... Sed tio estas homa afero. Mi diras, ke la libereco de esprimo devas atenti la homan realaĵon kaj pro tio mi diras, ke ĝi devas esti prudenta kaj edukita. La prudento estas la homa virto, kiu regas niajn rilatojn».

Ankoraŭ dum la flugo el Manilo al Romo la Papo menciis la “teorion pri la genro” (socia sekso, ankaŭ soci-kultura sekso aŭ genro) kiel unu el la “ideologiaj koloniigoj de la popoloj”, laŭ la endoktrinigitaj klopodoj de la diktaturoj. Lia konkreta ekzemplo estis la kondiĉo starigita antaŭ 20 jaroj de argentina ministrino pri edukado, kiu ligis la financadon de la lernejoj kun la uzo de libroj pri tiu teorio. Pri la koloniigo de la popoloj li konsilis legi la libron “La mastro de la mondo” de Robert Hugh Benson.

Kun la larmoj en la okuloj Francisko

priskribis la gestojn de la filipinoj, kiuj ege kortuŝis lin. Li antaŭanoncis siajn vojaĝojn al Latinameriko kaj Afriko. Kaj pro tio, ke la papa aviadilo superflugis Ĉinion, li diris: «Ni estas malfermitaj kaj ni volas la pacon kun ĉiuj. Kiel iras la rilatoj? La ĉina registaro estas bonedukita, ankaŭ ni estas bonedukitaj, ni faras la aferojn paŝon post paŝo. Ili scias, ke mi pretas akcepti ilin aŭ iri tien. Ili scias tion». Li parolis pri kontraŭkoncipo kaj respondeca gepatreco, sed pri la nombro da gefiloj li ankaŭ diris: «Kelkaj opinias, ke – senkulpigu mian vorton, ĉu? – por esti bonaj katolikoj ni devas esti kiel kunikloj. Ne. Respondeca gepatreco: pro tio en la Eklezio estas studgrupoj pri la geedziĝo, la fakuloj pri ĉi tiuj temoj kaj multaj kaj multaj licaj manieroj, kiuj helpas. Plia afero: por la pli malriĉaj filoj estas trezoro; estas vere, ke ankaŭ ĉi-teme oni devas esti prudentaj, sed filo estas trezoro. Respondeca gepatreco, sed ankaŭ atenti la malavarecon de tiu patro aŭ patrino, kiu vidas en la filo aŭ en la filino trezoron».

LA MONAĤA VIVO DE BENEDIKTO LA 16-a

La ĉefa itala ĵurnalo “*Corriere della Sera*” intervjuis ĉefepiskopon Georg Gänswain, prefekto de la Papa Domo kaj historia sekretario de Benedikto la 16-a, pri la nova vivo de la emerita Papo, du jarojn post lia rezigno.

Ekscelenco, pasis du jaroj ekde kiam Benedikto la 16-a anoncis sian rezignon je la papado. Ĉu li foje parolas pri tio? Kiel li pritaksas, hodiaŭ, tiun decidon?



Benedikto la 16-a estas konvinkita, ke la decido alprenita kaj komunikita estas tiu ĝusta. Li ne dubas pri tio. Li estas trankvilega

kaj certas pri tio: lia decido necesis kaj ĝi estis alprenita “post plurfoja ekzameno de mia konscienco fronte al Dio”. Ĝi estis la konscio, ke la fortoj de la korpo kaj de la animo ekmankis; ke oni devas konsideri ne sian personon, sed la bonon de la Eklezio. La motivoj estas ĉiuj en lia deklaro. La Eklezio bezonas fortan timoniston. Iuj aliaj pritaksoj kaj hipotezoj estas eraraj.

Oni difinis la decidon de Ratzinger granda gesto en la regado de la Eklezio.


Vi tute pravas: ĝi estis grandega gesto en la regado de la Eklezio.

Kion diri al tiuj, kiuj daŭre dubas pri la valideco de la rezigno aŭ pri la elekto de Francisko?

Oni ne povas bazigi hipotezojn sur aferoj, kiuj ne estas veraj, kiuj estas tute absurdaj. Benedikto mem diris, ke li alprenis sian decidon kun plena libereco, sen iu ajn premo. Kaj li certigis “sindonemon kaj obeemon” al la nova Papo.

Sed kial estiĝas tio? Ĉu ĝi estas manko de sento pri la Eklezio?

Jes, la duboj pri la rezigno kaj la elekto naskiĝas el tio.



Kiel fartas hodiaŭ Benedikto la 16-a? De tempo al tempo iuj lanĉas alarmojn pri lia sanstato...

Ekzistas multe da koscia malsincero, da malamaj sentoj. Benedikto estas preskaŭ 88-jaraĝa: estas normale, ke, pro la aĝo, foje la kruroj estigas al li iom da problemoj, jen ĉio. Li havas sian ĉiutagan ritmon, li estas tre metoda. Kaj lia kapo bonege funkcias, lia menso estas potenca. Kiam Universitato Urbaniana dediĉis al li la ĉefaŭlon kaj kardinalo Filoni proponis al li pretigi lekcion por la komenco

de la universitata studojaro, Benedikto la 16-a verkis belegan tekston pri la Vero, kiun li petis al mi legi publike anstataŭ li.

Kiel li pasigas la tagojn?

Lia tipa tago komenciĝas per la sankta Meso matene, kiel ĉiam, sed iom pli malfrue ol antaŭe, je la 7.45. Poste sekvas la dankaj preĝoj, la breviero, malgranda matenmanĝo. Dum la mateno li preĝas, legas, studas, pri-traktas la korespondaĵojn kaj foje li ricevas vizitojn. Ĉirkaŭ je la 13.30 ni tagmanĝas kaj poste ni faras promenon sur la teraso, du aŭ tri cirkaŭiroj, antaŭ ol li iru ripozi. Je la 16.15 ni iras al la vaticanaj ĝardenoj: ni promenas ĝis la groto de Lurdo, ni preĝas, ni trapreĝas la rozarion. Pli poste estas ankoraŭ tempo por la preĝo, la studo. Ni vespermanĝas je la 19.30 kaj ni spektas italan televidan ĵurnalon. Vespere Benedikto la 16-a trapreĝas la kompletion en la kapelo kaj poste li iras al sia ĉambro. Kvankam foje li ludas pianon.

Ĉu li ankoraŭ ludas la pianon?

Jes, nature: ĝuste deposit la lastaj semajnoj li denove ludas ĝin pli ofte. Ĉefe la muzikon de Mozart, sed ankaŭ aliajn muzikpecojn, kiuj venas al lia kapo tiumomente; li ludas parkere...

Papo Ratzinger decidis havi la nomon de la patro de la okcidenta monaĥismo. Liaj tagoj memorigas tiujn de monaĥo...

Jes, li elektis monaĥan vivon. Li eliras nur kiam Papo Francisko tion petas al li; por ĉio cetera, li ne akceptas invitojn. Li aranĝas sian vivon tiel, kiel li decidis: mi elektis ĉi tiun vivon, li diras, kaj mi devas resti kohera kun mia elekto.

Benedikto kaj Francisko ne estas la samaj personoj: tio estas tute logika afero. Kio estas komuna en ili?

La esprimmaniero estas malsama, foje tre malsama. Sed komuna en ili estas la esencaĵo, la enhavo, la kredotrezoro, kiun oni devas anonci, akceli kaj defendi.

Mons-ro Georg Gänswein estas prefekto de la Papa Domo. Li laboras por Papo Francisko kaj estante delongtempa persona sekretario de Ratzinger, li decidis daŭre loĝi kun la emerita Papo en monaĥejo *Mater Ecclesiae* en Vatikano. Li, do, estas “ponto” inter la du Papoj, kiuj, li sciigis, “skribas, telefonas kaj sendas invitojn unu al la alia”.

EPIFANIO: VENAS LA SAĜULOJ EL ORIENTO POR ADORI JESUON

Kiuj estis la Saĝuloj, kiuj adorkliniĝis fronte al la Infano Jesuo?

Laŭ orienta kroniko de la 8a jc. ili estis dek du, kaj ilia nombro varias laŭ la diversaj bildoj en la katakomboj. Ĉiukaze numero 3 ebligas identigi la saĝulojn kun la tri rasoj, kiuj laŭ la malnova testamento devenas el la tri filoj de Noa.

Laŭ apokrifaj evangelioj iliaj nomoj estis Gasparo, Melĥioro kaj Baltazaro. Gasparo, reĝo mistikulo de Armenio, lasis la regadon al sia frato Ntikran, por iri serĉi Jesuon. Li estis kruda junulo, ido de Ĥam, unu el la filoj de Noa. Baltazaro, araba reĝo el la dezerto, estis juna kaj brunhaŭta, kaj li estis el la idaro de Jafet. Melkioro estis la kromnomo de la hinda maharaĝo Ram, kiu same postlasis la regadon al sia frato, por iri al Jerusalemo kune kun la saĝa Tse-linata, sia amiko. La kromnomo fontis el la frazo, kiun li eldiris surgenue fronte al la Infano Jesuo: “*Cham el Kior*” (mi vidis Dion). Li estis maljuna, kun blankaj, longaj kaj buklohavaj haroj kaj barbo kaj li estis el la idaro de Sem.

Necerta estas ilia deveno. La ĝenerala indiko “el oriento” varias laŭ la konsultitaj tekstoj: Persio aŭ Kaldujo, aŭ Sabeujo (nuna Jemeno), aŭ Hindio. La saĝuloj forlasis sian landon rapide, kiam, laŭ rakonto de Johano Krizostomo, sur la pinto de monto aperis al ili stelo en formo de belega infano kun kruco sur la kapo. Ili vojaĝis rajdante dromedarojn, rapidegaj bestoj, kiuj trairas en unu tago tiom da distanco, kiom ĉevalo povas dum 3 tagoj. Ili alvenis al Jerusalemo post 13-taga vojaĝo. Laŭ alia rakonto, la vojaĝo de la saĝuloj daŭris 2 jarojn, dum kiuj tamen ili ne bezonis nutraĵojn, la montoj ebeniĝis fronte al ili, la riveroj ne starigis barojn.

Fine en Bet-Leĥemo ili proponis al la Savanto oron, olibanon kaj mirhon, donacojn, kiujn la persoj kaj ĥaldeoj kutimis alporti al reĝoj, kaj kiuj estis simboloj de dia majesto, reĝa regado kaj homa mortaleco. Olibano estas aroma rezino uzata kiel incenso. Mirho estas la sekiĝinta bonodora gumrezino el la trunkoŝelo de afrika kaj araba arbo.

Kiam ili revenis al siaj landoj, ili portis, laŭ la orientaj legendoj, la donacon ricevitajn el la manoj



Albert Dürer, 1504 – La Adorado de la Magoj

de Infano Jesuo aŭ de la Virgulino: laŭ la diversaj versioj temis pri ŝtono prenita el la staltrigo, aŭ pri ronda pano, aŭ pri unu el la vidoj uzitaj por Jesuo; ĉiukaze la versioj same diras, ke el la donaco aperis sankta fajro, inda je kultado.

Ankaŭ post sia morto en la orientaj teroj la Saĝuloj daŭre vojaĝis. Iliaj korpoj, ĉu iliaj aŭ ne, tamen fariis pli longan kaj pli misteran vojaĝon ol tiu, kiu kondukis ilin al Bet-Leĥemo.

Iliajn korpojn retrovis Helena, patrino de imperiestro Konstanteno, kiu ordonis ilian transporton al Konstantinopolo, en la preĝejo de sankta Sofia. La milana episkopo Eustorgio estis rajtigita poste porti la korpojn al Milano en kolosa romia sarkofago, ankoraŭ hodiaŭ videbla en la baziliko de sankta Eustorgio en Milano.

Certe tiuj relikvoj restis en Milano ĝis 1164, kiam Frederiko Ruĝbarbulo venkis la milanojn. La mortajn restaĵojn de la saĝuloj oni portis al Kolonjo, kien ili alvenis la 23-an de Julio 1164. Ankaŭ pri ĉi tiu vojaĝo estas mistero, ĉar la vera itinero ne estas konata: plejverŝajne la transporto okazis sekrete, por eviti la kontraŭecon de la loĝantaro de Milano. Iu kroniko diras, ke oni ŝajnis la transportadon de parencoj mortintaj pro pesto.

La relikvoj estas ankoraŭ en la katedralo de Kolonjo. En 1973 la ĉefepiskopo de Kolonjo redonis fragmenton de la ostoj al la preĝejo de sankta Eustorgio.

LAIKA MISIISTO BALDAŬ BEATA

Inter la dekretoj aprobitaj de la Papo en julio pri la agnosko de heroecaj virtoj de 7 Diservantoj, estas tiu por la beatproklamo de itala laika misiisto d-ro Marcello Candia.

Li estis filo de riĉa familio de la norditalia urbo Milano, sed lia naskiĝo okazis en la suditalia urbo Portici la 27-an de Julio 1916, ĉar tie lia patro mastrumis fabrikon de karbonacido.

Li doktoriĝis pri ĥemio, farmacio kaj biologio. Lin edukis al la kredo lia patrino, kiun li akompanis por la asistado al malriĉuloj en la periferioj de Milano. Dum la 2-a mondmilito li aliĝis al la rezisto-movado, li helpis hebreojn fuĝi el la manoj de nazi-faŝistoj. Post la milito, kune kun kapucenaj pastroj, li sin dediĉis al la senhejmigitoj kaj aranĝis vilaĝon por knabinoj-patrininoj.

En 1965 li decidis vendi sian fabrikon por vojaĝi al Brazilo, al la amazonia arbaro, kiel laika misiisto. Multaj malaprobis lian decidon, sed li rebatis: “Ne sufiĉas doni ekonomian helpon. Necesas kundividi kun la malriĉuloj ilian vivon, almenaŭ tiom, kiom eblas. Tro komforte estus, se mi restus ĉi tie en bonstata kaj trankvila vivo, por poste diri: la superfluaĵon mi sendas tien. Mi estas vokata vivi kun ili!”. Li starigis malsanulejon en Macapà; sekvis pluraj aliaj realigoj: leprulejoj, sanitaraj centroj, lernejoj, volontulaj asocioj, monaĥejoj, seminarioj kaj preĝejoj. En 1980 Johano Paŭlo la 2-a renkontis lin en la leprulejo de Marituba, kie li kreis komunajn de religiuloj-flegistoj, kiuj vivas kune kun la malsanuloj, dividante la suferojn kaj mildigante ilian solecon.


Marcello flegis kaj ĉirkaŭbrakis ameme siajn leprulojn: “Kiam vi amas” – li diris – “vi ne plu ekrimarkas la kriplesojn, ĉar aspektas bela al vi la animo, la amikeco kaj la amemo de ĉi tiuj malsanuloj, kiuj fariĝis parto de mia vivo”.

Samkiel okazas, kiam oni faras bonon,

Marcello Candia konstante travivis ĉiuspecajn kontraŭecojn, enviojn, klaĉaĵojn, kalumniojn. Li fordonis ĉion, kion li posedis, kaj tamen li estis eĉ akuzata de unu el siaj kunlaborantoj pri ŝtelado en unu el la centroj de li fondita. Sed li ne konfuziĝis pli ol iom.

Post serio da infarktoj, li malkovris, ke li suferas je haŭta kancero. Li mortis en Milano la 31-an de Aŭgusto 1983, 76-jaraĝa. “Ne estas mi, kiu donis ion,” – li diradis – “sed la malriĉuloj donas al mi. Mi estas nenio. Mi estas nur humila rimedo de la Providenco”.

La agnosko de la heroecaj virtoj koncernas aliajn 6 Diservantojn. Ili estas: la portugala Antonio Ferreira Viçoso (1787-1875), episkopo en Brazilo; la hispana pastro Saturnino López Novoa (1830-1905); la franca salezana pastro Augusto Arribat (1879-1963); monaĥino Maria Veronika de la Pasiono (Sophie Leeves), naskita en Turkio en 1823 kaj mortinta en Francio en 1906, kiu konvertiĝis el anglikanismo al katolikismo; la itala Elena da Persico (1869-1948) ĵurnalistino, verkistino,



fondintino de laika religia ordeno kaj Gaetana de la sanktega Sakramento (Carlotta Fontana), superulino de religia ordeno, vivinta de 1870 ĝis 1935.

Islamaj ekstremistoj vokas al “sankta milito”. Papo Francisko alvokas al dialogo laŭ la klopodoj faritaj antaŭ 795 jaroj de la samnoma Malriĉuleto de Asizo.

SANKTA FRANCISKO KAJ ISLAMO

Francisko el Asizo klopodis plurfoje iri al landoj de Islamo. En 1211 li enŝipiĝis en Ancona (centrorienta havenurbo en la nuna Italio) por atingi Sirion, sed la ventoj puŝis la ŝipon al Dalmatio, de kie li revenis al Ancona. En 1212-1213 li iris al Hispanio por daŭrigi la vojaĝon al Maroko, sed malsano haltigis lin kaj devigis lin reveni al Porziuncola (la eta preĝejo de Asizo, kie li starigis sian unuan grupon kaj kie li mortis en 1226). La franciskanaj tekstoj de la 13-a jc. diras, ke li volis renkonti la islamanojn “pro soifo je martiriĝo”. Ankaŭ poeto Danto menciis tion, en sia poemo “La Dia Komedio”:

Kaj poste, soifante martiriĝi,
en fiera ĉeesto de l’ Sultano
predikis Kriston li kaj sekvantaron.

(Paradizo, XI, 100-102, traduko de Peterlongo)

En la landoj de Islamoj estis martirigitaj minoraj fratuloj: la 5 franciskanaj pramartiroj, murditaj en Maroko la 16-an de Januaro 1220. Ilia martiriĝo okazis kelkajn monatojn post la vojaĝo de Francisko al Egiptio. En 1221 la «Kapitulo (= Kunveno) de la matoj» en Asizo konsilis tre prudentan sintenon ĉe la islamanoj por la predikado.

Aŭguste de 1219 Francisko estis en Damietta (arabe Domyāt, ĉe la delto de Nilo), kie de du jaroj okazis la 5-a Krucmilito (1217-1221) por rekonkeri Jerusalemon, rekaptitan de Sultano Saladino en 1187.

Palestino en 1218 ekapartenis al la egipta Sultano, el kurda deveno, al-Malik al-Kāmil, posteulo de sia patro la frato de Saladino, post la komenco de la Krucmilito: pro tio la militaj operacoj direktiĝis al Egiptio, ĉefe ĉe la strategia haveno de Damietta. La krucmilitista ŝiparo komencis ĝian sieĝadon la 29-an de Majo 1218.

La kristanaj estroj estis: la titulara reĝo de Jerusalemo Johano de Brienne (naskita en 1148 kaj mortinta en 1237), la reĝo de Hungario Andreo la 2-a (1205-1235), la duko de Aŭstrio Leopoldo la 6-a de Babenberg (1198-1230). Sed grandan influon por la decidoj havis la papa legato la



Sankta Francisko el Asizo

kardinalo de Albano Paio Galvão, portugala benediktano.

En ĉi tiu etoso de milito Francisko, kune kun frato Illuminato, ricevis de la papa legato la rajtigon trapasi, dum la batalhalto inter la malvenko de la 29-a de Aŭgusto 1219 kaj la posta novembro venko de la krucmilitistoj, al la kampo de la saracenoj por renkonti, sen armiloj, je sia propra risko kaj danĝero, la Sultanon mem.

Jacques de Vitry, episkopo de Akko, en letero de la printempo 1220, skribis al Papo Honorio la 3-a: “Li ne timis iri mezen de la armeo de niaj malamikoj kaj dum multaj tagoj li predikis al la saracenoj la Parolon de Dio, tamen sen multe da frukto”.

Francisko renkontis la spiritan direktoron kaj konsilanton de al-Kamil, Fakhr ad-din al Fârisî. Oni ne scias, kion ili diris al si.



Francisko ĉe Sultano (Pentraĵo de Giotto (1297-1300) en Baziliko de Asizo)

Celo de la renkonto estis povi prediki la Evangelion persone al la Sultano, kun la celo konverti lin kaj liajn soldatojn, aŭ almenaŭ konvinki ilin

kapitulaci, por eviti senutilajn sangoelverŝojn. La Sultano dum kelkaj tagoj aŭskultis lin, poste, kaptita de la timo, ke iu el la armeo aliĝus al la kristana armeo, li ordonis, ke oni rekonduku la du fratulojn al la kampo de la krucmilitistoj kun paspermeso por viziti Palestinon.

Ke Francisko suferis perfortaĵojn de la soldatoj, aŭ ke li ricevis valorajn donacojn de la Sultano, estas legendoj tute senbazaj, kiuj apartenas al tiuepoka hagiografio (Tommaso el Celano, sankta Bonaventura...). Oni scias nur, ke li restis en Damietta ĝis la konkero de la urbo fare de la kristanoj; poste, naŭzita de la perfortoj faritaj de la krucmilitistoj, li foriris kaj restis kelktempe en Sirio kaj fine li revenis al Italio. Li komprenis, ĝuste en Damietta, ke milito pro religiaj motivoj alportas nenian pozitivan rezulton.

En 1247 Tommaso el Celano, laŭ tasko de la superulo de la minoraj fratoj, verkis plian hagiografion pri sankta Francisko, asertante, ke ĉi-lasta antaŭvidis la malvenkon de la kristanoj ĉe Damietta kaj invitis la krucmilitistojn ne ekbatali; oni ne aŭskultis lin kaj la kristana armeo travivis sangoplenan malvenkon (probable tiun de la 29-a de Aŭgusto 1219).

La dialogo inter Francisko kaj la Sultano Iu altsenta renkonto



Pri kio parolis sankta Francisko kaj la Sultano? Tute inventita estas la teksto, kiun ni publikigas ĉi tie. Tamen, la sekva dialogo povus esti parto de meditado bazita sur la historio pri la renkonto de Francisko kun Sultano al-Malik al-Kāmil en Damietta. Aliaj fontoj enprenas la ĉapitrojn 16 kaj la ĉapitron 22:1-4 de la nebulea Regulo. Ĉi tiu lasta estas kelkfoje indikita kiel Testamento de Francisko de 1219, verkita antaŭ lia forveturo al Oriento. Ĝi entenas la vidadon de Francisko pri senkondiĉa amo al ĉiuj – ankaŭ al tiuj opiniataj “la malamiko”.

Sultano: Mi estas surprizita, ke vi sukcesis transpasi la frontliniojn ĝis alveni ĉi tien, sanktulo.

Francisko: Ankaŭ mi estas surprizita vidi vin, Sinjoro Sultano, mi opiniis, ke mi trasuferos la sorton de la martiroj.

Sultano: Mi certigas vin, ke tio ne estis malprobabla.

Francisko: Kaj la martiriĝo estas multekosta!

Sultano: Bedaŭrinde, ni ambaŭ havas longan tradicion pri martiroj. Tamen, mi lernis, ke la martiriĝo en si mem ne estas virto.

Francisko: Nepre. Miaj fratoj klopodis konvinki vin kaj vian popolon dum pli ol kvin jaroj, cedi al la Kredo de Jesuo Kristo. En Maroko, antaŭ pli ol 3 jaroj, kelkaj pagis la prezon pro tio.

Sultano: Laŭ tio, kion mi aŭdis, ili estis terure insistemaj pri la konvertiĝo de marokanoj. Ili eks-citis la sentivecon de la homoj, kiuj, fine, havigis al ili la martirigon kiun ili celis.

Francisko: Jen ĝuste la demando. Martiroj malofte havas la plezuron longe kaj kore interparoli kun la kontraŭuloj. Se ili estus interparolintaj kaj lernintaj respekti unu la alian, eble la martirigo estus estinta same arkaika kiel la konstruo de la piramidoj.

Sultano: Ĉu do vi venis por dialogi?

Francisko: Mi ne vidas alian manieron por atingi la interkomprenon, kaj vi?

Sultano: Sed krom la klopodo konverti unu la alian al la vera Kredo, kion ni havas por diri al ni?

Francisko: La historio pri via saĝeco antaŭas vin. Vi studis meze de ni, vi estas amiko de nia imperiestro, vi soifas je kono kaj vero. Mi scias, ke vi havas multon por instrui al mi.

Sultano: Ĉu do vi venis ne por instrui, sed por lerni?

Francisko: Ĉu estas iu pli bona instruisto, ol tiu kiu estas dispona lerni?

Sultano: Kvankam vi estas malgrandulo, ŝajnas ke vi estas scipovanto pri saĝeco!

Francisko: Mi ne estas certa pri tio. Venante ĉi tien, mi havis mil demandojn: kial viaj militistoj estis tiel afablaj al mi, kial oni permesis al mi transpasi ĉiujn haltigajn postenojn, kial ĉiuj haltadis por la preĝado dum nia irado, kial ili havas grajnoj kvazaŭ de kolĉeno en siaj manoj, kial ili kliniĝas respekteme al mi, ilia fido aspektis tiel vera...

Sultano: Jes, jes, mi komprenis, vi havas amason da demandoj.

Francisko: Jen kio min venigas ĉi tien, homo sen demandoj estas homo kiu ne havas okulojn por vidi.

Sultano: Mi ĉiam opiniis, kontraŭe, ke vi kristanoj pensas, ke vi havas ĉiujn respondojn, kvankam, kompreneble, mi scias ke malfacile vi bridas la hipokritan fanatikecon.

Francisko: Mi kuraĝus diri, ke via respondo montras signon de humileco, iu virto kiu estas al mi tre kara. Kial ni konstruas simplajn respondojn por malsimplaj demandoj?

Sultano: Ni ambaŭ estas batalantaj por defendi nian sanktan landon kontraŭ profanado. La problemo estas, ke vi opinias ke estas ni tiuj kiuj malsanktigas ĝin, dum ni estas terurigitaj je la penso, ke vi povos reakiri ĝian regadon kaj ĉiamigi ĝian malsanktigon. Kaj la batalado daŭras! Teorie, per sufiĉaj rezervoj el mono kaj malamo oni povus daŭrigi ĉi tiun bataladon, mortigante unu paganon post la alia – sed kiu estas efektive pagano? – ĝis restos neniu alia krom ni du. Je tiu punkto, de kiu la venko?

Francisko: Kia avantaĝo estas en la venko?

Sultano: Se mi venkas, tiam mi estas certa, ke Alaho estos laŭdata, kaj ke ĉiuj homoj adoras nur lin.

Francisko: Se tiel, ŝajnas al mi ke oni deziras ne la pacon, sed nur la venkon.

Sultano: Kaj kia estas la diferenco? Se oni povas ĉesigi ĉi tiun fratmortigon, ĉar sciu, nur pri ĉi tiu temas, se ni kapablas haltigi ĉi tiun senutilan buĉadon, fine ni havas la pacon.

Francisko: Sed Sultano, sinjoro, ne eblas ke en via menso vi kredas ke la paco estas iu simpla venko, ke iu “Venko” povas forviŝi militojn, dum vi bone scias, ke ĝi alportos nur malammon kaj daŭrajn klopodojn pri venĝo, ne la pacon. Vi bone scias, ke estas nek venko nek paco kiam unu el la du partioj “venkas”.

Sultano: Mi vidas, ke mi havas antaŭ mi malamikon pli grandan ol mi supozis!

Francisko: Vi havas antaŭ vi nur fraton, kontraŭ kiu vi batalas.

- Sultano:* Se nur ni povus agi en la konscio, ke ni ĉiuj devenas el la sama Kreinto! Se nur ni povus vidi unu la alian tra la okuloj de la Grandulo kaj de la Sanktulo.
- Francisko:* Nur viaj vortoj havas sencon. Fine vi ĉesis paroli pri venkoj kaj komencis paroli pri la realo.
- Sultano:* Realo? La sango kiun mi vidas ĉiutage estas reala, ĝi fluas el la filoj, el la edzoj, el la onkloj de veraj homoj. Ankaŭ se iliaj pensoj antaŭ la morto estis pri kolero aŭ pri malamo aŭ pri justeco, mi povas certigi vin, ke ne tiaj estis iliaj lastaj pensoj. Dum la vivo forglitis, ili probable pridemandis sin “Je kiu kosto?”. Realo estas vorto malpermesita sur la batalejo. Se ni estus konsiderintaj la realon, neniam ni estus renkontiĝintaj en ĉi tiuj inferaj tranĉeoj, sed ni estus ĉiuj ekirintaj hejmen, al tiuj kiujn ni amas kaj volas ŝirmi kontraŭ ĉiu malbono, kaj kiujn ni prizorgas.
- Francisko:* Prizorgo, kiu estas nur nedaŭrema kaj trompa, se vi tion permesas al mi, Sultano. Ŝirmataj por kio? De kio? Por kiom da tempo? Se ni ne estas en paco kun nia Dio kaj se ni ne konas la saĝon de la amo al la proksimulo, nia tuta proksimulo, neniam ni havos la sekurecon, kiu venas al la amo al ambaŭ, Dio kaj la proksimulo. Mi lernis, ke la sekureco venas nur kiam mi NE estas sekura, kiam mi vivas je la servo de la aliaj pere de tio, kion la aliaj deziras de mi.
- Sultano:* Enestas io profunda en ĉi tiu altruismo! Kiam nia konscienco kreskos ĝis tia punkto en la tenereco, ke ĝi igos nin agi por eviti la homan mizeron, pli ol por venĝi ĝin?
- Francisko:* Mi vidas, ke vi kaj mi havas komunan celon: teni Dion for de ĉi tiu terura milito batalata en la nomo de la Ĉiopova!
- Sultano:* Kial glorigi niajn batalojn, ilin honorante per dia komisiio?
- Francisko:* Almenaŭ nun oni parolas pri vera paco...
- Sultano:* kaj pri vera venko.
- Francisko:* Kiu venkas se nia Dio estas venkata?
- Sultano:* Kaj ĉu Alaho povos depostuli la venkon, kiam liaj filoj kaj filinoj estas buĉataj kaj agniantaj?
- Francisko:* Vidu, ankaŭ vi havas demandojn por fari. Se sole nia mondo estus havinta la kuraĝon travivi ĉi tiujn demandojn. Mi scias, ke vi rekonas mian Sinjoron kaj Majstron kiel grandan profeton, kaj mi scias, ke vi scipovas aprezi la sanktajn Vortojn kiujn li lasis al ni: se ni ne mortas al ni mem por vivi por Dio kaj por la proksimulo, se semo ne falas teren kaj ne mortas, ĝi restas nur tritika grajno, kondamnita ne doni frukton.
- Sultano:* Kaj se kontraŭe ĝi mortas, ĝi vere naskiĝis al nova vivo.
- Francisko:* Jes. La amo ne mortas sur la kruco, ĝi simple decidis ne batali, ĝi estigis senfinan amon.
- Sultano:* Amo vera kaj eterna, la amo de la Kreinto, taksante altvalora ĉiun eron de tio, kion la Kreinto koncipis.
- Francisko:* Kaj ĉu la kreitaro ne estas tute resumita en unu vorto? Unu sola realo: PACO, unu el la nomoj de Dio.
- Sultano:* Fakte! Nia dialogo helpas min kredi, ke la paco estas ebla. Pro tio estu laŭdo al Alaho!
- Francisko:* Jes, paroli kun vi konigis al mi la bonecon de la Sinjoro, kiu estas tre pli granda ol mi povis imagi. Mi tial deziras starigi al mi tiujn demandojn, kiuj malfermas neelpensitajn horizontojn kaj ebligas neatenditajn renkontojn, kiel la ekkonon de persono altvalora kiel vi.
- Sultano:* Estas malmultaj la homoj, de kiuj mi povas aŭdi ĉi tiujn vortojn, kaj pri kies sincereco mi povas fidi.

Francisko: Sultano, mi estas malriĉulo. Mi havas nenion por oferi al vi, krom mian honestecon.

Sultano: Nu, mi dankas vin tute humile. Se mi ne estus permesinta ke vi venu ĝis mi en ĉi tiu kampadejo, en ĉi tiu nokto, neniam mi estus povinta kompreni kiom altvalora povas esti iu Kristano.

Francisko: Kiajn kaj kiomajn malkovrojn ni povas fari kiam ni lasas nin esplori?

Sultano: Kaj kion signifas esplori, se ne entrepreni vojaĝon kiun ni ĉiuj povas fari, kiam ni eniras en la misteron de Alaho, ĉiam pli ol ni opinias ebla kaj ĉiam malpli ol oni povas antaŭsupozi?

Francisko: Jes, enestas tiom granda mistero kaj tioma grandeco en nia bona Dio! La laŭdo leviĝas spontana sur la buŝo de tiuj kiuj rekonas la kompleksecon kaj la simplecon de nia Dio.

Sultano: Tiel estu, kune ni laŭdu – kaj esploru – nian Dion Bonan kaj Mizerikordan!

Kune Francisko kaj la Sultano preĝas:

«Vi estas sankta, Sinjoro, ununura Dio, kiuj faras mirindajn agojn.

Vi estas forta, Vi estas granda, Vi estas altega, Vi estas ĉiopova reĝo, Vi, Patro sankta, reĝo de la ĉielo kaj de la tero.

Vi estas triunua kaj unu, Sinjoro Dio de la dioj.

Vi estas la bono, ĉia bono, la plejalta bono, la Sinjoro viva kaj vera.

Vi estas amo kaj karitato, Vi estas saĝo, Vi estas humileco, Vi estas pacienco, Vi estas beleco, Vi estas mildeco, Vi estas sekureco, Vi estas kvieto.

Vi estas ĝojo kaj gajeco, Vi estas nia espero, Vi estas justeco, Vi estas modereco, Vi estas nia tute sufiĉa riĉeco.

Vi estas beleco, Vi estas mildeco.

Vi estas protektanto, Vi estas gardanto kaj nia defendanto, Vi estas forteco, Vi estas refreŝigo.

Vi estas nia espero, Vi estas nia fido, Vi estas nia karitato.

Vi estas nia tuta dolĉeco, Vi estas nia eterna vivo, granda kaj mirinda Sinjoro, Dio ĉiopova, mizerikorda Savanto».



Benozzo Gozzoli:

Sankta Francisko ĉe Sultano Malik al Kamil

Tradukis Antonio De Salvo

“Mi estas la pano de vivo. Viaj patroj manĝis la manaon en la dezerto, kaj mortis. Jen la pano, kiu malsupreniris de la ĉielo, por ke oni manĝu el ĝi kaj ne mortu. Mi estas la viva pano, kiu malsupreniris de la ĉielo; se iu manĝos el ĉi tiu pano, tiu vivos eterne; kaj la pano, kiun mi donos, estas mia karno, por la vivo de la mondo”. *Joh 6,48-51*

“MALFERMI HORIZONTOJN PERE DE VALIDAJ FAKTOJ DE ESPERANTO”

La 20-an de Aprilo estos 5 jaroj depost la forpaso de nia amata Pastro Duilio Magnani (1928-2010), dum jaroj IKUE-prezidanto, senlaca apostolo de E-o kaj, en la lastaj vivojaroj, motoro de multaj bonfaraj projektoj. Por memori lin en la 5-a datreveno de lia naskiĝo al la Ĉielo, ni “lasas la parolon” al li, publikigante intervjuon faritan en 2007 okaze de la aljuĝo de Premio Deguchi kaj ĝis nun neeldonitan.

Kiel naskiĝis la ideo (aŭ la inspiro, se Vi preferas) uzi Esperanton por ornamaj preĝejoj?



Se mi devas esti sincera, la reala fakto instiginte min ornamaj la malgrandan paroĥan preĝejon estis la finiĝo de mia IKUE-prezidanteco ordonita de mia Episkopo. Oni malpermesis al mi eĉ veturi al Romo kaj oni ordonis

al mi plie animzorgi, kvazaŭ ke mi ne jam faris tion konsciencem kaj akurate. Pro nostalgio kaj venki mian E-izoligon mi revis pri la pasintaj IKUE-atingoj kaj fantaziiis en la silento de mia preĝejo. En tia religia medio, rimarkinte la povran vestaĵon de mia preĝeja interno, naskiĝis la unua ideo plibeligi ĝin per memorigo de plej grava E-evento: la Meslibro. Ĝi revokis la unuan lingvan batalon en historio de la Eklezio, t.e. Papo Adriano la 2-a, kiu en la jaro 868 aprobis la slavan lingvon de la Fratoj Cirilo kaj Metodio en la tiutempa roma Liturgio. Do, kial ne bildigi la duan similan lingvan historian eventon en mia preĝejo? Tiuj slavaj Sanktuloj sukcesis venki la kuriajn barojn kaj

Papo Wojtyła same. Do, ni honorigu lin. Sed, kiamaniere? Pli ol pentraĵojn mi preferas la mozaikaĵojn, eble tio pro Ravenna-influo. Tiel estis decidite voki Majstron pri mozaikaĵoj el Ravenna s-ron Antonino Vaccalluzzo, kaj mi komisiis al li la “Paskan Misteron” kun je la centro la vitralo bildiganta Kriston Resurektintan. La unua papa E-saluto “Urbi et Orbi”, multfoje petita de mi, ringe kronas la bildon de Kristo. Estis la jaro 1996 kiam aperis en la



preĝejo la unua E-mozaiko. La plena konsento de la fidelularo instigis min pripensi aliajn ĝis la lasta okazo de la Esperantista Ekumena Kongreso okazinta en Rimini septembre 2003, tuj antaŭ la fermo de mia paroĥo.

Ĉu la elektita enhavo iel respegulas Vian vivon?

Kompreneble. La enhavo de la ornamaĵoj estas ĉiuj inspiritaj al religiaj temoj kaj al la paroĥa animzorgado, kiuj enkadritaj en la preskaŭ tridekjara poresperanta periodo, malfermiĝis al tutmonda horizonto per evangelizado kaj bonfarado pere de la internacia idiomo. Ne nur, la plej granda ĝojo estas por mi ekmiri, ke la fidelularo iom post iom malfermis sian bonfaran horizonton al la povrujoj inter la povrujoj, al ekumena kaj al la interreligia dialogo,



ĉio pere de Esperanto. Ĝi ne estas plu skandalo aŭ hobia, perdo de tempo kaj infaneca utopio.

Vidante Rimini-n hodiaŭ, urbon de turismo kaj amuziĝo, oni ne pensus, ke ĝi povas esti urbo kun malfacilaj situacioj. Kaj tamen, en Via biografio mi legis, ke via infaneco estis malriĉa, ke vi eĉ almozpetis por povi studi.

Jes, mi ne hontas konfesi mian kamparan devenon. Male, mi sentas min orgojle filo de kamparanoj, riĉaj nur je malsanoj kaj je familia ĝojo. Neniu povas forgesi sian infanecon, des pli se travivitan kaj trafitan, precipe dum la milita periodo, malproksime de siaj vilaĝo kaj eĉ hejmo. Mi komprenas nun pli bone, vizitinte la afrikajn landojn, la peton de la malriĉuloj pri la alfabetigo kaj studado ol tiu pri la vivrimedoj. Plifacile oni akceptas la akvan soifon ol la klerigsoifon. Efektive, en ili mi revivas mian infanecon, kiam mi kun prezentbileto de mia paroĥestro frapis je la pordo de kelkaj bonŝanculoj de la vilaĝo kaj de la najbaraj urbetoj. Vere, la alfabetigo valoras pli ol la pano. Mia koro ploras, kiam al niaj gesamideanoj el



foraj Landoj mi devas respondi, ke mankas la mono. Efektive, oni ne povas certe monhelpi al ĉiuj, sed tio malvarmigas la sangon en la vejnoj.

Unu el viaj karakterizoj estas la “kuraĝo” (cetere, eco tipa de via regiono); vi ne hezitas kontakti “gravulojn”, por prezenti Esperanton kaj ĝian realaĵon. Ĉu ĉe aŭtoritatuloj dum la jaroj Vi konstatis pli aŭ malpli favoran sintenon rilate la la movado?

Bedaŭrinde, la malfavora ĝenerala sinteno al Esperanto estas bone konata de ĉiuj. Ankaŭ en nia religia medio. Tamen se ni, anstataŭ paroli pri Esperanto, parolas pri konkretaj atingoj – ekzemple la Meslibro, la Dekretoj de Vatikanaj Instancoj, la paskaj kaj kristnaskaj bondeziroj “Urbi kaj Orbi” – neniuj kuraĝas moki vin. Ili sindetenas, kvankam ili ne konsentas, tamen la faktoj kaj la objektoj pripensigas ilin. Ne multe diferencas la pasinteco ol la nuna tempo rilate la sintenon al Esperanto. Mokis min antaŭ tridek jaroj Kardinaloj kaj laboristoj samkiel lastatempe pastroj kaj fideluloj, kiuj tamen ne konis min kaj kiuj neniam aŭdis aŭ vidis ion konkrete.



En mia dioceza medio neniuj, aŭ nur malmultaj kunpastroj, kuraĝas ankoraŭ moki mian agadon. Tamen, gravulo aŭ ne, konatulo aŭ ne

konatulo, kiam oni, sen tro da vortoj, prezentas la Meslibron al kredantoj, aŭ al nekredantoj la “evangelion” de Maŭ, kiel okazis al iu Kardinalo ĉe Vatikano, tiam oni vidas ŝanĝi la mienon kaj la sintenon. Kardinalo, kiu akuzis min, ĉar mi perdadis valoran tempon anstataŭ animzorgi, respondis, vidinte la E-verkojn de Maŭ: “Ho! Vere, mi ne eksciis tion”. Oni ne bezonas vortojn. Necesas faktoj. Tro da predikantoj kaj malmultaj da atestantoj, oni diras religinivele. Same en Esperantio. Oni devas eniri en la socion ne per belaj konferencoj, sed per videblaj kaj validaj faktoj, kiuj celtrafu la atenton de la aŭskultantoj. Ekzemple, valoras ege pli multe E-Meso en la Katedralo, des

pli bone prezidata de la loka Episkopo, des pli multe de Kardinalo, ol dek Universalaj Kongresoj.

NOTO PRI LA JUBILEO DE LA MIZERIKORDO

Papo Francisko anoncis en la Baziliko de sankta Petro la celebren de ekstervica Sankta Jaro. Ĉi tiu Jubileo de la Mizerikordo komenciĝos per la malfermo de la Sankta Pordo de la vatikana Baziliko en la soleno de la Senmakula Koncipiĝo de Maria 2015 (la 8-an de Decembro) kaj finiĝos la 20-an de Novembro 2016, soleno de Nia Sinjoro Jesuo Kristo, Reĝo de la Universo. Kun la Jubileo de la Mizerikordo Papo Francisko starigas je la centro de ĉies atento la mizerikordan Dion, kiu invitas ĉiujn reveni al Li. La renkonto kun Li inspiras la virton de la mizerikordo.

La unua anonco de la Jubileo okazis en la dua datreveno de la elekto de Papo Francisko, dum la prediko de la pentofara celebrego, per kiu la Papo inaŭguris la iniciaton “24 horojn por la Sinjoro”, kiu celas eksterhoraran malfermon de la preĝejoj en la tuta mondo por la

celebrego de la sakramento de la repaciĝo. En la dimanĉo de la Dia Mizerikordo (la 12-an de Aprilo) okazos la oficiala kaj solena anonco de la Sankta Jaro per la legado kaj publikigo de la papa Buleo ĉe la Sankta Pordo.



La komenco de la venonta Jubileo koincidas kun la 50-a datreveno de la fermo de la Dua Vatikana Koncilio (1965) kaj pro tio ĝi alprenos apartan signifon, instigante la Eklezion daŭrigi la agadon startintan per tiu Koncilio.

Dum la Jubileo la legaĵoj por la dimanĉoj de la ordinara tempo estos prenitaj el la Evangelio laŭ Luko, nomata “La Evangeliisto de la Mizerikordo”. Poeto Dante Alighieri difinis lin “*scriba mansuetudinis Christi*”, “rakontanto pri la mildeco de Kristo”. Tre konataj estas la paraboloj de la mizerikordo ĉeestantaj en la Evangelio laŭ Luko: la perdiĝinta ŝafo, la perdita draĥmo, la mizerikorda patro.

Historio de la Jubileoj

En la malnova tempo ĉe la hebreoj la Jubileo estis jaro deklarita sankta ĉiun 50-an jaron, dum ĝi oni devis redoni egalecon al ĉiuj gefiloj de Israelo, proponante novajn eblecojn al la familioj, kiuj perdis siajn propretojn kaj eĉ la personan liberecon. Al la riĉuloj, male, la jubilea jaro memorigis, ke venos la tempo kiam la israelaj sklavoj, denove fariĝintaj egalaj al ili, povus depostuli siajn rajtojn. “La justico, laŭ la leĝo de Israelo, konsistis ĉefe el la protekto de la malfortuloj” (*Sankta Johano Paŭlo la 2-a, “Tertio Millennio Adveniente”, 13*).

La katolika Eklezio komencis la tradicion de la Sanktaj Jaroj kun Bonifaco la 8-a en

1300. Li antaŭvidis Jubileon ĉiun 100-an jaron. Ekde 1475 – por ebligi al ĉiu generacio travivi almenaŭ unu Sanktan Jaron – la ordinara Jubileo estis fiksita ĉiun 25-an jaron. Ekstervican Jubileon, male, oni anoncas okaze de evento el aparta graveco.

La ordinaraj Sanktaj Jaroj celebritaj ĝis hodiaŭ estas 26. La lasta estis la Jubileo de la jaro 2000. La kutimo anonci ekstervicajn Jubileojn datiĝas de la 16-a jarcento. La lastaj ekstervicaj Sanktaj Jaroj, de la pasinta jarcento, estis tiuj de 1933, starigita de Pio la 11-a en la 19-a jarcenta datreveno de la Elaĉeto, kaj tiu de 1983, starigita de Johano Paŭlo la 2-a, en la 1950-a jaro post la Elaĉeto.

Signifo kaj ritario de la Jubileoj

La katolika Eklezio donis al la hebrea Jubileo pli spiritan signifon. Ĝi konsistas el

ĝenerala pardono, el indulgenco alirebla fare de ĉiuj, kaj el la ebleco renovigi la rilaton kun

Dio kaj la proksimulo. Tial la Sankta Jaro estas ĉiam ebleco por pliprofundigi la kredon kaj vivi per renovigita sindevigo la kristanan ateston.

La komenca rito de la Jubileo estas la malfermo de la Sankta Pordo: ĝi estas pordo, kiun oni malfermas nur dum la Sanktaj Jaroj: ĝi restas masonita en la aliaj periodoj. Ĝia malfermo simbolas la koncepton laŭ kiu, dum la Jubileo, oni proponas al la fideluloj “eksterordinaran iradon” al la savo.

La Dia Mizerikordo en la vortoj de Francisko

La mizerikordo estas temo tre kara al la Papo, kiu, kiam li estis episkopo, elektis kiel sian devizon “*miserando atque eligendo*”; ĝi estas citaĵo el la Homilioj de sankta Beda la Respektinda, pastro, kiu, komentante la evangelian rakonton pri la voko de sankta Mateo, skribis: “*Vidit ergo Iesus publicanum et quia misera atque eligendo vidit, ait illi Sequere mi*” (Jesuo vidis impostiston, kaj ĉar Li rigardis lin kun sento de amo kaj elektis lin, Li diris al li: Sekvu min). Ĉi tiu prediko estas omaĝo al la Dia Mizerikordo. Traduko de la devizo povus esti “per la okuloj de la mizerikordo”.

En la unua dimanĉo post la elekto Papo Francisko parolis dufoje pri la Dia Mizerikordo. Unue dum la Meso en la paroĥo de sankta Anna en Vatikano li diris: “La mesaĝo de Jesuo estas alia: la mizerikordo. Por mi, mi diras tion humile, ĝi estas la plej forta mesaĝo de la Sinjoro: la mizerikordo. Ni revenu al la Sinjoro. La Sinjoro neniam laciĝas pardoni: neniam! Estas ni, kiu laciĝas peti pardonon al

Estas Sankta Pordo en la 4 ĉefaj Bazilikoj de Romo: Sankta Petro, Sankta Johano ĉe Laterano, Sankta Paŭlo Ekster la Muregoj kaj Sankta Maria la Granda. Sed por la venonta Jubileo Papo Francisko decidis, ke en ĉiuj urboj kaj diocezoj, en la bazilikoj kaj katedraloj, en la pilgrimlokoj estu malfermita la Pordo de la Mizerikordo, por ke la Jubileon oni povu celebri ankaŭ loke “kiel signon de kunuleco de la tuta Eklezio”.

Li”. Dum la posta Anĝeluso li aldonis: “Senti mizerikordon. Ĉi tiu vorto ŝanĝas ĉion. Ĝi estas la plejbono, kiun ni povas senti, ĝi ŝanĝas la mondon. Iom da mizerikordo igas la mondon malpli malvarma kaj pli ĝusta. Ni bezonas kompreni bone ĉi tiun mizerikordon de Dio, ĉi tiun mizerikordan Patron, kiu havas multe da pacienco” (la 17-an de Marto 2013).

La 11-an de Januaro 2015, antaŭ la Anĝeluso, li deklaris: “Hodiaŭ oni multe bezonas mizerikordon. Gravas, ke la laikaj fideluloj travivu kaj portu ĝin al la diversaj sociaj medioj. Antaŭen! Ni travivas la tempon de mizerikordo, ĉi tiu estas la tempo de mizerikordo”. Ankoraŭ: en sia mesaĝo por la Karesmo Francisko skribis: “Kiom mi deziras, ke la lokoj, en kiuj manifestiĝas la Eklezio, aparte en niaj paroĥoj kaj komunumoj, fariĝu insuloj de mizerikordo meze de la maro de la indiferenteco!”.

En la itallingva eldono de la Apostola Instigo *Evangelii gaudium* la vorto “mizerikordo” aperas eĉ 31 fojojn.

SIMPLA PREĜO

Ho Sinjoro, faru el mi ilon de via paco:

Kie estas malamo, zorgu ke mi alportu la Amon.
Kie estas ofendo, ke mi alportu la Pardonon.
Kie estas malkonkordo, ke mi alportu la Unuecon.
Kie estas dubo, ke mi alportu la Kredon.
Kie estas eraro, ke mi alportu la Veron.
Kie estas malespero, ke mi alportu la Esperon.
Kie estas malĝojo, ke mi alportu la Ĝojon.
Kie estas mallumo, ke mi alportu la Lumon.

Ho Majstro, zorgu ke mi ne klopodu tiom:

Por esti konsolata, kiom por konsoli.
Por esti komprenata, kiom por kompreni.
Por esti amata, kiom por ami.
Ĉar:
Nur donante, oni ricevas.
Nur pardonante, oni estas pardonata.
Nur mortante, oni reviviĝas al la Eterna Vivo.

Sankta Francisko el Asizo

PAGI PER PREĜO... PARKADO KOSTAS UNU SALUTON MARIA'N

San Lorenzo (sankta Laŭrenco) de Rovetta estas trankvila vilaĝo en la provinco de Bergamo (Italio), kie vivas preskaŭ 1200 homoj. Ĉar ĝi estas sufiĉe malgranda, ĝi ne disponas je multaj lokoj kie parki aŭtomobilojn kaj samkiel la pli grandaj urboj, ankaŭ ĉi tiu vilaĝo suferas la mondan komunan parkad-problemon.

Por helpi tiujn, kiuj havas malfacilaĵojn por trovi parklokon, ĉu civitanojn ĉu eksterulojn, alvenis la propono de pastro Guido Rottigni, kiu gvidas la vilaĝan paroĥon ekde 2008. Li proponis disponigi al la publiko la parklokon de la paroĥo. Ĝis ĉi tie, nenio stranga, krom la fakto, ke la parkejo ne estas tute senpaga: kiu volas parki en ĝi, tiu devas kvitigi sian ŝuldon per trapreĝo de unu Saluton Maria.

Tial la paroĥestro aranĝis indikilon, tute konforman al la preskriboj de la leĝa veturkodo, por informi la civitanaron kaj la eblajn uzantojn: “Ĉiu parkado, 1 Saluton Maria-n”.

“Ĝi estas unu el la malmultaj parko-areoj en San Lorenzo – klarigis la paroĥestro. Ni disponigas ĝin, sed anstataŭ pensi al konvencioj aŭ ekonomiaj akordoj, se eble kun la Komunumo, ni decidis, ke oni ne pagas per eŭroj, sed per preĝo”.

Kiel eblis prognozi, la novan pagmanieron ŝatis la vilaĝanoj kaj ĝi estis sukceso tiom, ke la paroĥestro anoncis eblajn alĝustigojn: “Efektive, por la pli grandaj veturiloj, almenaŭ 2 devus esti la Saluton Maria”.

Oni ne scias, ĉu la ideo de la paroĥestro celis protekti la stirantojn, kiuj dum sensukcesa serĉo de parkloko ofte blasfemas, sed restas la fakto, ke ĝi estas aranĝo, kiu en Italio, plena je altkostaj parkejoj, aspektas miraklo.

Nur unu dubo leviĝis: kiu kontrolos ĉu la preĝo estas eldirata?

“Ni konfidas nin je la Bona Dio kaj je nia fido je la personoj”, respondis la paroĥestro.



<https://www.youtube.com/watch?v=gwK8XS-leic>

RESONANCO

Resono estas reflekso de la sono, reflekto estas reflekso de la lumo.

Nek unu el ili kun si alportas ion el la medio, el kiu ĝi refleksiĝis.

Ambaŭ efektoj estas pasemaj kaj pli ĝuste ili apartenas al atentemo de fizikistoj aŭ poetoj ol al bezonoj de la ĉiutaga vivo de plejmulto de mortemuloj.

Krom la supre menciitaj efektoj estas al ni proksima kaj praktike utila alia reflekso: ŝaŭmo. Ankaŭ ĝi estas rapide pasema, sed ion ĝi en si portas.

Alivorte...

La ŝaŭmo estas konsistaĵo de la tutaĵo, el kiu ĝi estiĝas. Malgraŭ tio, ke ĝi en si portas enhavon de la profundaĵo, ĝi ekzistas nur surface.

Max Kaŝpari

Ni funebras kaj kondolencas

LESZEK HENRYK ŁĘGOWSKI (1933-2014)

Nia IKUE-ano naskiĝis la 22-an de Novembro 1933 en Bydgoszcz (Pollando). Tie li edukiĝis kaj laboris profesie. En 1954 li finis sian lernadon en Liceo pri bibliotekismo kaj



poste, ĝis la fino de 1993 li laboris en la Centra Oficejo por Eksterlandaj Rilatoj de la Polaj Ŝtataj Fervojoj (PKP). Li ankaŭ aktivis en la Asocio de la Katolikaj Ĵurnalistoj de sia urbo. Leszek fariĝis esperantisto en 1966. De tiam li ĉeestis en diversaj esperantistaj renkontiĝoj kaj kongresoj: universalaj, ekumenaj, katolikaj, fervojistaj. Li verkis ankaŭ poeziaĵojn: komence nur por si mem kaj por la geamikoj. Liaj versoj inspiriĝis ĉefe el la urbo Bydgoszcz, kiun li tre amis, kaj al religia spiritualeco. Lia publika debuto okazis en 1990 per la apero de liaj tekstoj en du religiaj revuoj de Bydgoszcz kaj Krakovo. Ekde 1996 li partoprenis en la tutlandaj poeziaj konkursoj, dum kiuj kelkfoje fariĝis laŭreato. Liaj verkoj “Aŭtunaj folioj en Miedzygórze” kaj aliaj poemoj eniris aliajn landojn dank’ al la tradukoj faritaj de Urszula Tupajka el Bydgoszcz. Ekde 1995 la tradukojn prizorgis Zofia Kamieniecka kaj Bogusław Sobol. Liaj esperantigitaj poemoj aperadis en E-revuo kiel: Frateco, Gdanska Esperantisto, Dio Benu, Hispana E-bulteno, Valencia Luno, Franca Katolika Esperantisto kaj la itala Katolika Sento. La aŭtoro multfoje prezentis siajn poemojn dum diversaj aranĝoj, renkontiĝoj, feriadoj kaj kongresoj, ankaŭ ekumenaj kaj de IKUE. Leszek krome eldonis multajn versajkolektojn en la pola lingvo kaj kelkajn en Esperanto, i.a.: “Vi estas unika vojo”. Komence de Aŭgusto 2014 li estis enhospitaligita kaj unu monaton poste, la 8-an de Septembro 2014 li forpasis. Lia funebra rito okazis la sekvan 12-an de Septembro en la paroĥa tombejo Kossak en Bydgoszcz. (*Informis Bogusław Sobol*).


KRISTO RESUREKTINTA

Kristo resurektinta
donu amon, pacon kaj veron,
kaj via Mizerikordo
estu nia fid’ kaj espero!
Ĝoj’ de l’ Sankta Maria,
Patrin’ de Krist’ Sinjoro,
ĉiutage nin gvidu
al Resurekt-aŭroro!

L. H. Łęgowski

HANS BAKKER (1937-2015)

La 21-an de Januaro forpasis en Amsterdamo, post elĉerpa malsano, Hans Bakker, honora



membro de Universala Esperanto-Asocio. Li naskiĝis la 8-an de Novembro 1937. Filo de aktivaj esperantistaj gepatroj, Hans Bakker lernis E-on ĉirkaŭ la jaro 1953. Unikan lokon en la historio de Esperanto Hans Bakker havis pro sia laboro por la afrika agado de UEA, kiun li gvidis de 1980 ĝis 2001. El lia celkonforma kaj persista laboro rezultis, ke la tuta afrika kontinento aperis sur la mapo de Esperanto kaj UEA, kie ĝi antaŭe preskaŭ plene mankis. Li sciis kolekti ĉirkaŭ si reton de entuziasmaj kunlaborantoj, kiuj persone gvidis la lingvo-lernadon de afrikanoj. Por ĉi tiu agado li kunlaboris. i.a. kun la tiama IKUE-prezidanto pastro Duilio Magnani.

Ripozon eternan donu Sinjoro al ili, kaj senfina lumo lumu al ili, ili ripozu en paco. Amen.